

ROLO DE LA REGIONAJ FEDERACIOJ

LISTO DE EBLAJ PARTOJ DE LA FEDERACIAJ AGOSFEROJ

KAMPO 1 : Regiona Kunordigado

1. Kunsidoj, jarkunvenoj, kongresoj
2. Rilatoj kun la kluboj kaj izolitaj esperantistoj
3. Subteno al la kluboj : konsilado, helpo...
4. Helpo al stariĝo aŭ plifortiĝo de kluboj
5. Rilatoj kun UFE. Partopreno kaj reprezento de la tutregiona movado en la landaj instancoj (komitato de UFE, Interfederacia Konferenco...)
6. Dudirekta perado inter la kluboj kaj UFE
7. Federacia asekuro por la kluboj

KAMPO 2 : Informado kaj Komunikado

1. Federacia, komuna gazeto por ĉiuj membroj kaj kluboj (kun eblo de klubaj gazetoj)
2. Federacia, komuna retejo. Regiona diskutlisto
3. Disponigo de landaj aŭ federaciaj komunikaj materialoj
4. Partopreno senpera aŭ per kluboj en lokaj aŭ regionaj aranĝoj por informi
5. Partopreno en la landaj kampanjoj
6. Rilatoj kun politikistoj kaj oficialaj instancoj
7. Informado pri la lokaj kaj regionaj aranĝoj, agadoj kaj novaĵoj per esperantistaj gazetoj aŭ retejoj kaj per amaskomunikiloj

KAMPO 3 : Instruado kaj Ekzamenoj

1. Laŭbezona helpo al la klubaj kursoj : materialoj, monkontribuo por aĉeto de lerniloj, konsilado al la instruantoj...
2. Grupa mendo de lerniloj al libroservoj
3. Organizo senpera aŭ per kluboj de regionaj ekzamensesioj
4. Organizo de regionaj staĝoj

KAMPO 4 : Kulturo kaj Aranĝoj

1. Organizo de kulturaj aŭ lingvaj publikaj aranĝoj
2. Subteno mona aŭ materiala al klubaj aranĝoj aŭ projektoj
3. Organizo senpera aŭ per kluboj de traregionaj prelegvojaĝoj
4. Disponigo de federacia aŭ landa libroservo
5. Utiligo de Esperanto en loka kaj regiona turismoj : traduko de turismaj slipoj kaj komunikiloj... Atentigo al la lokaj instancoj pri turisma utileco de Esperanto
6. Instigo al ĝemeligoj de kluboj kun eksterlandaj kluboj surbaze de la ĝemelrilatoj de la koncernaj urboj. Atentigo al la lokaj instancoj pri ĝemelrilata utileco de Esperanto